

Ho mia kara hejma ter'

Kein schöner Land in dieser Zeit

1. Ho mi - a ka - ra hej - ma ter',
plej be - la er' de ni - a sfer',
kie ni kun - ve - nas, kie ni pro - me - nas
dum la ves - per'. dum la ves - per'.

2. Ĉi tie ofte sidis ni
en rond', kun gaja melodi'
pri l' amikaro.
Tra la kverkaro
eksonis ĝi.
3. Ke en ĉi valo onte ni
renkontu nin, donacu Di'.
Ni plur-cent-foje
kunvenu ĝoje
en harmoni'.
4. Nun bonan nokton, frat', fratin'!
De supre Dio gardos vin.
Li kun boneco,
kun bon-koreco
protektos nin.

KEIN SCHÖNER LAND • M kaj germana T: Anton Wilhelm Florentin von Zuccalmaglio 1838 (M laŭ popolkanto de la 18a jarcento) • E: Otto Bonte, 1996 en: Josef Schiffer, Mia kantaro I, 66 • prilaboro (4a strofo novtradukita): Albrecht Kronenberger 2018-12-25

Jen la germana originalo:

1. Kein schöner Land in dieser Zeit,
als hier das unsre weit und breit,
wo wir uns finden
wohl unter Linden
zur Abendzeit.
2. Da haben wir so manche Stund
gesessen da in froher Rund
und taten singen,
die Lieder klingen
im Eichengrund.
3. Dass wir uns hier in diesem Tal
noch treffen so viel hundertmal,
Gott mag es schenken,
Gott mag es lenken,
er hat die Gnad'.
4. Jetzt, Brüder, eine gute Nacht,
der Herr im hohen Himmel wacht!
in seiner Güten
uns zu behüten,
ist er bedacht.

Anton Wilhelm Florentin von Zuccalmaglio 1838

Jen la traduko de Otto Bonte:

1. Ho mia kara, hejma ter'
Plej bela sur la tuta sfer',
Kie ni kunvenas,
Kie ni promenas
dum la vesper'.
2. En tiu valo ofte ni
Renkontu nin en harmoni',
Ree ĝojante,
Ree kantante,
Se donos Di'.
3. Ĉi tie ofte sidis ni
Kun gaja rondkant-melodi',
De l' amikaro,
Tra la kverkaro
Eksonis ĝi.
4. Adiaŭ karaj fratoj nun,
Admonas leviĝinta lun';
Sed post malhelo
Sur la ĉielo
Ekbrilos sun'.

*E: Otto Bonte
1996 en: Josef Schiffer, Mia kantaro I, 66*